FEBRUARO 1949 DUA JARO No. 8

# LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

## Interparolo.

*(En la TJO-Kunveno en Groet estis principe akceptata, ke partoprenontoj en IJK antaŭe devas trapasi iun ekzameneton. Tio i.a. povus konsisti el simpla interparolo, kiel ĉi sube. — Volonte ni ricevos ankaŭ aliajn proponojn).*

Georgo: Bonan tagon, Valerio, mi havas novaĵon por vi.

Valerio: Ĉu por mi?

G.: Jes, por vi. Mia fratino Lenjo iros al Parizo.

V.: Kia feliĉulino! Fari tian belan vojaĝon estus mia plej granda plezuro.

G.: Vi povos havi tiun plezuron, se vi iros kun Lenjo al Parizo.

V.: Neeble. Tio kostas tro multe da mono. Unue mi devus havi monon por la vojaĝo, kaj due por gastloĝi en hotelo.

G.: Efektive. Sen mono oni nenion povas fari. Multe da mono vi tamen ne bezonas.

V.: Kiel do? Bonvolu klarigi, mi petas.

G.: Tre simple. Lenjo vojaĝos kun multaj aliaj gejunuloj kune. Tio estas malmultekosta.

V.: Kaj la hotelo? Ĉu la prezo ne estos terure alta?

G.: La junularo tute ne estos en hotelo. Bonege oni dormas somere en tendo. Kaj en barako aŭ en lerneja ĉambro estas dolĉe ripozi sur pajlomatraco.

V.: Ha, nun mi komprenas, ke la elspezoj ne estos tro grandaj. Mi parolos kun miaj gepatroj. Vidu, jen alvenas mia amikino Maŭrino. Mi informos ankaŭ ŝin. Hej, Maŭrinjo, atendu momenton. Mi havas novaĵon por vi. Adiaŭ, Georgo!

G.: Saluton, Valerio, ĝis revido!

## Nenio sen peno.

Anjo trovis nukson en la ĝardeno. Ĝi estis ankoraŭ en la verda ŝelo. La infano pensis, ke ĝi estas pomo kaj volis ĝin manĝi. Sed ŝi baldaŭ forĵetis ĝin.

„Fi do! Kiel amara estas tiu frukto!" ŝi diris.

Johano, ŝia plej aĝa frato, kaptis la frukton, forigis la ŝelon kaj diris:

„Mi ne atentas tiun amaran ŝelon, ĉar mi scias, ke ĝi kaŝas tre bongustan kernon."

**Respondu al jenaj demandoj:** Kiu trovis nukson? Kie ŝi trovis la nukson? Kiel ĝi aspektis? Kion pensis la infano? Kion ŝi faris? Kial ŝi forĵetis la nukson? Kio estas la nomo de ŝia frato? Kion li faris? Ĉu Johano formanĝis la ŝelon? Kia estis la kerno? Ĉu Johano formanĝis la kernon?

## La pipro-arbeto kaj la miristiko.

La pipro-arbeto kreskas sur la insuloj Java kaj Sumatra. Ĝi portas malgrandajn grapolojn da fruktoj, kiuj estas proksimume tiel grandaj kiel riboj.

Kiam oni muelas tiujn grajnojn kun la ŝeloj, oni ekhavas nigran pipron. Kiam oni muelas ilin sen la ŝeloj, oni atingas pli bonan kvaliton: la blankan pipron.

La miristiko estas arbo sur la insuloj Molukoj. Ĝi estas kelkfoje dek metrojn alta. Ĝia frukto estas tiel granda kiel persiko kaj entenas malgrandan nukson, la muskaton.

## Enigmoj (la solvojn vi trovos aliloke).

1. En kio fuŝulo en remboato similas bovon?
2. Per kia briko oni ne povas konstrui domojn?
3. Kia ovo povas dormi en lito kaj manĝi kuketojn?

## Tro bona!

Patrino: „Ho, mia kara fileto, kiel malbona estas via lerneja atesto!"

Filo: „Sed la instruisto diris, ke ĝi estas tro bona por mi!"

A. Mehtonen, Oulu, Finnlando.

## Rezulto de bona laboro.



Kiu povas fari verkaĵon ĉe la supraj bildoj? Por la plej bona verkint(in)o ni havas belan premion! Sendu la verkaĵojn antaŭ 1 aprilo al TJO-Centro en WestGraftdijk, Nederlando.

## B (por la infanoj).

B estas burĝono, kiu fariĝos flor'.
B estas la brilo de l' suno el or'.
B estas la brulo en homa la kor'.
B estas balzamo; tute kaj plene odor'.

B estas balonoj, liberiĝontaj de fortaj fadenoj.
B estas Babilono, kun siaj pendantaj ĝardenoj.
B estas blankaj betuloj apud fabelaj bienoj.
B estas ja gigantaj profundmaraj balenoj.

B estas bazalto, malmola kiel rok'.
B estas boato, nun ankoraŭ sur iu dok'.
B estas la bileto, pere de ĝi mi vojaĝas al ĉiu lok'.
B estas birdo kun plorkria vok'.

B estas la bluo de l' ĉielo ĉie ĉirkaŭ.
B estas mi venos, venos ......... baldaŭ.

Rogiero.

**Fornombraĵoj** (rimaĵetoj por fornombri) *).

Unu du tri,
for ja **vi.**

La flo-roj en ĝar-de-no,
la u-**nu**-a el la ĉe-no.
(Ĉi-poste la dua, tria, kvara k.t.p.)

Ni es-tas nun ses-o-pe,
Ses-o-pe estas **ni.**

(Poste ĉiufoje unu pli malmulte, kvinope, kvarope k.t.p. Ni komencu kun, sesope, dekope, kvarope aŭ alie, depende de la nombro de la kunludantoj.)

En al-ta, al-ta tu-ro
mi ti-ris je la ŝnu-ro;
ŝnu-ron jes ja rom-pis mi,
for-i-ĝu *vi.*

Rogiero.

---

*) Ludonte ekz. kaptadon aŭ kaŝadon, oni lotas, pere de fornombraĵo, kiu komencu la kaptadon aŭ serĉadon. La ludontoj staras en rondo, kaj unu el ili diras la fornombraĵon, montrante ĉe ĉiu silabo (aŭ vorto) al la sekva rondano; li komencu ĉe sia maldekstra najbaro. Tiu kiun li montras dirante la dike presitan silabon, foriru el la rondo. Tion oni daŭrigas, ĝis restas nur unu, kiu do estas la unua kaptulo aŭ serĉulo.

**Ludo** (Ĉasado en gazeto).

Ĉiu ludanto havas antaŭ si la saman numeron de iu Esperanto-organo (ekzemple „La Juna Vivo"). La gvidanto nomas iun urbon, personon, aŭ libron, kies nomo troviĝas en la gazeto. La ludanto, kiu unue trovas la nomitan vorton ricevas poenton. Kiu en la fino havas la plej multajn poentojn, gajnis la ludon. Oni povas honori lin (ŝin) en amuza maniero. Ekzemple: La ludanto faras paroladeton pri la „kuraĝa ĉasisto". Kaj tiu rakontas pri siaj aventuroj.

**Solvoj de la enigmoj:** 1. Ambaŭ remaĉas. — 2. Lumbriko. — 3. Litovo (enloĝanto de Litovujo).

## AL NIAJ ANOJ/ABONANTOJ.

Malgraŭ niaj instigoj multaj ankoraŭ **ne** pagis sian kotizon por la jaro 1949. Se oni ne deziras daŭrigi sian abonon ja decas informi pri tio la administradon antaŭ la komenciĝo de nova jaro. Kiu **ne** faris tion ŝuldas do almenaŭ la jam aperintajn numerojn! Al la nederlandaj abonantoj ni prezentos kvitancon, al la eksterlandaj legantoj ni lastfoje petas: sendu vian kotizon al via landa ĉefperanto (vidu la liston en la novembra numero)!

# INTERNACIA JUNULARKUNVENO

en Versailles (Francujo) 2-9 aŭg. '49.

Versailles: Sorĉa nomo!

Versailles: Unu el la plej belaj urboj en la tuta mondo! La urbo, kiu plej pasie allogas nin! La urbo de arto kaj historio! La restadejo de la „Sunreĝo”.

Versailles kun la mondfama kastelo: Memoraĵo pri la pompaj festoj, sed ankaŭ pri la belaj artoj de la XVII-a jarcento! La belega Parko!

Versailles! Kiu lernejano aŭ junulo ne revas iam viziti ĉi tiun faman urbon?

La TJO-anoj havos tiun okazon! Nia IJK ja ĉijare okazos en tiu „perlo” de Francujo. Ĉu povas ekzisti iu dubo pri la sukceso de kunveno en tia regiono? Kaj — ne nur la regiono, ankaŭ la programo estos alloga.

Prezidanto de la organiza komitato estos la vicurbestro de Versailles. Plue helpos la „Franca Ligo pri Instruado”. Kaj (tre grave!) la prezidantino de la Ligo „France Esperanto”, kaj estrino de la Esperanto-Sekcio ĉe la franca radio ankaŭ estas anino de la organiza komitato. Certe multaj jam aŭdis ŝiajn informojn per la radio.

La komitato sindone laboras, kaj ne ŝparos penon por kiom eble plej bone akcepti nin. Reciproke ni povas helpi ilin per **baldaŭa,** kaj **klara** anoncado. — Se vi povos kontribui en la vesperaj programoj, bonvolu sciigi tion!

Jen jam kelkaj informoj:

LOĜADO: Ni povos disponi pri du aŭ tri lernejoj. Estos tie bonaj litoj, sed verŝajne oni mem devos kunporti kovrilojn. En unu el la lernejoj estas granda festsalono kaj manĝejo.

EKSKURSOJ: Du vizitoj al Parizo, sub la gvidado de la Pariza grupo. — Ekskurso al la kasteloj de Rueil Malmaison kaj Saint-Germain en Laye, per aŭtobusoj. — Vizito al la Moderna Lernejo en Suresnes, piede aŭ vagonare. — Vizitoj al la Kastelo de Versailles, al la Parko kaj arbaroj. — Ni vidos la mirindajn, mondfamajn „Lumfestojn” de Versailles! La piroteknikaĵojn!

KOSTOJ: TJO-anoj ĝis 16-jaraĝaj: 35 guld. (£ 3/6); pliaĝaj: 40 guld. (£ 4). Ne-TJO-anoj: 50 guld. (5 £).

Kune kun la aliĝilo oni sendu la duonan sumon. La duan parton oni pagu antaŭ 1 julio.

Atentu bone: en la kostoj ĉio estas enkalkulita: loĝado, manĝado kaj la belegaj ekskursoj! Plue la komitato ankoraŭ klopodas kolekti iom da mono, por ke malriĉaj, junaj partoprenantoj povu pagi iom malpli.

Al ĉiuj plenaĝuloj, kiuj povos doni etan subvencion por tiu celo ni de ĉi tie urĝe petas: helpu laŭpove, por ke ankaŭ la malriĉaj TJO-anoj povu partopreni! (Vi povas sendi vian donacon ankaŭ pere de viaj landaj ĉefperantoj, sed prefere rekte al la franca ĉ.P.

ANONCADO: Uzu por tio la en ĉi tiu numero enpresitan aliĝilon kaj sendu ĝin kiom eble plej baldaŭ al la franca ĉefperanto: s-ro Roger Bizet, Wierre-au-Bois par Samer, P. d. C.

Kiu anoncos sin post 15 majo pagos 3.— guld. (6 ŝil) pli. Post 1 julio oni ne plu povos anonci sin.

Kaj nun, geamikoj, grandnombre anoncu vin! Estos loko por multaj!

Kiu bezonas oficialan invitilon en la franca lingvo, bonvolu peti tiun al S-ro Omont, 66 rue Albert Joly, Versailles. Oni bonvolu aldoni respondkuponon.

Nur tiuj, kiuj bone povas paroli, rajtas partopreni! Estos premioj por la infanoj kaj junuloj, kiuj plej bone parolas.

Oni nepre kunportu naciajn kostumojn.

Ne forgesu muzikilojn!



La unua estraro kaj konsilantaro de la Brazila Junular-Organizo la 7.an de novembro, 1948a.

---

**VARBU VIAN KORESPONDANTON POR „LA JUNA VIVO".**

# KORESPONDADRESOJ

**Aŭstrio:** Flora Seligo, fakinstruistino, Salzburg-Aigen, Ernst Greinstr. 6, dez. kor. kun gesamideanoj en la tuta mondo.

**Britujo:** Heather Makwell (13-j.), 76 Richardson St., Ashington, Northumberland, deziras korespondi.

**Bulgarujo:** Ivon Z. Kukuŝev, str. „20" No. 13, Peŝtera, P. R., 16-j. gimnaziano dez. kor. kun samaĝuloj en diversaj landoj.

**Ĉeĥoslovakujo:** S-ro Bedrich Pagác, Masarykova 137, Karlovy Vary-Dvory, 27-j., dez. kor. pri ĉiuj temoj, inters. poŝtm. kaj poŝtkartojn.

S-ro Milan Schovanec, Tr. Kl. Gottwalda 3, Karlovy Vary, 18-jara, deziras korespondi prefere kun samideaninoj.

S-ro Borek Brchán, Tr. Kl. Gottwalda 3, Karlovy Vary, 18-jara, deziras korespondi.

S-ro Miroslav Vingralcik, Tr. Kl. Gottwalda 5, Karlovy Vary, 18-jara, deziras korespondi.

S-roj Jiri Mosna, Ĉeskych bratrí 668, Jicín k. Jaromiír Sücker, Horní Studenec 28, p. Horní Studenec, dez. interŝ. gaz., esp. poŝtk. kaj poŝtm.

Tutmonda Asocio Nepo, Ovesné Kladruby u Mar, Lázni, deziras korespondadon (per P.K.) kun la nederlanda junularo.

V. Skocen, Záry-Albrechtice u Krnova, dez. kor. kun gesamideanoj per leteroj aŭ poŝtkartoj, laŭdezire.

**Francujo:** 18 lernantoj (12-14-j.) dez. kor. kun samaĝaj gesamideanoj el la tuta mondo. Adr: Dumarquez, Lernejestro, Noeux-les-Mines, P. d. C.

Gekursanoj, 12-18-j. dez. kor. kun gekamaradoj el ĉiuj landoj de la mondo. Valida por Eŭropo 1 monaton. Skribu al: Bidoit E., 38 rue Chabaud, Reims.

**Germanujo:** Hilda Merres, Nürnbergo, Fichtestr. 10, 23-jara, dez. kor. kun gesamideanoj.

Rudolf Koch (21-j. horloĝisto), Mülheim/Koblenz, Bassenheimerstr. 4, deziras korespondi per leteroj kaj bildkartoj.

**Hispanujo:** 32-j. fraŭlino dez. interŝ. esperantaĵojn kaj kor. kun samaĝuloj. Teresa Ferre, Carretera de Montblanc 18, Alcover (Tarragona).

**Nederlando:** Lingvista studrondo akceptas gimnazianojn el tutmondo por kultura pensinterŝanĝo. Skribu al Universala Studorondo, Poŝtkesto 6021, Amsterdam.

Kiu volas korespondi kun 13-jara esperantisto skribu al: Jaap Oldenburger, Lumeystr. 41², Amsterdam-W.

La ĝemeloj Rinjo kaj Jenjo de Kort (pr. 14-jaraj), Zaanstraat 3, Utrecht, dez. kor. kun samaĝuloj.

**Skotlando:** Kiuj geknaboj volas interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun la anoj de mia klaseto: Roberto Bease (9½-j.), Muriel Dryburgh (11-j.), Nila Chalmers (10-j.), Gordon Lowe (9¼-j.), Robert Fraser (9½-j.). 2 Lady Helen St., Kirkcaldy.

**Uruguay:** Lernejanoj deziras korespondi kaj interŝanĝi lernejajn gazetojn kun ĉiuj landoj. Skribu al: „Compañeros", Calle Canelones 1122, Montevideo.

# 5-a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO

de T.J.O. en

VERSAILLES-Francujo (2-9 aŭg. '49).

**Aliĝilo.** (Skribu preslitere)

1. Familia nomo: s-ro, s-ino, f-ino ....................................
2. Antaŭnomo(j): ..........................................................
3. Adreso ..........................................................................
   ........................................ (lando)
4. Naskiĝdato ......................................
5. Profesio ........................................
6. Ĉu vi estas T.J.O.-ano ........................

---

(La demandojn en ĉi tiu fako respondu nur tiuj, kiuj estas malpliaĝaj ol 21-jaraj, kaj tiuj, kiuj petas financan helpon).

1. Profesioj de la gepatroj patro ................ patrino ................
2. Ĉu aliaj membroj de via familio partoprenos? Kiuj? (nomojn).
3. Nomoj kaj naskiĝdatoj de la gefratoj.

   ..........................................

   ..........................................

   ..........................................

---

Ĉu vi kunportos tendmaterialon?

..............................................................................

Mi pagas ........... por nutrado, loĝado kaj ekskursoj. 1)
Mi donacas ........... por helpi miajn plej malriĉajn kamaradojn.

Mi petas helpon de miaj gekamaradoj; mi nur povas pagi ..............
(ne malpli ol ¾ de la normala kotizo ĉar ........... (pravigu vian helppeton).

subskribo de la partoprenonto — subskribo de la gepatroj (de junuloj, ankoraŭ ne 21-j.)

..................................

..................................

1) Ce la anonco oni povas pagi la duonan kotizon. La ceteran parton oni pagu antaŭ 1 julio.

---

Vi deziras legi pri „Tutmonda Junular-Organizo" kaj „Denaska Esperantistaro", pri ĝiaj estiĝo kaj celo?
Mendu la T.J.O.-broŝuron ĉe via landa ĉefperanto aŭ rekte ĉe TJO-Centro en West-Graftdijk, Ned. Prezo: 1 resp. kupono.